mit Stolz auf eine reiche Geschichte und Kultur jeder nur denkbaren Ausprägung zurückblicken kann. Könnte es dafür einen besseren Beleg geben als unsere imposante Sammlung an Büchern, Zeitschriften und anderen Publikationen?

Utho Maier

Den kompletten Geschäftsbericht 2011 der Esperanto-Bibliothek Aalen kann man sich herunterladen: esperanto.de/deb/espbib/aalen2011.pdf (136 KB)

Einige VHS-Kurse in Deutschland

Erfreulicherweise kam und kommt es an verschiedenen Orten zu Kursen in der Volkshochschule. Ohne Anspruch auf Vollständigkeit hier einige Angebote.

VHS Herrenberg (bereits am 2.3.2012 begonnen)
www.vhs.herrenberg.de, Leiterin: Karin Krausz

VHS Halle
<http://vhs.halle.de>, Schnupperkurs von Hans-Peter Bartos (bereits am 20.03.2012)

VHS Koblenz, dienstags von 19h15 – 20h45, ab September 2012 Einführung am 31.08.2012 während des

Spracheninformationstages: Vortrag „Esperanto – eine internationale Kommunikationssprache“, 17-18 Uhr
Leiter: Dr. Matthias Hecking matthias.hecking@t-online.de
0175 5234742

VHS Kaufbeuren (27.02.-30.04.2012)
<https://vhs-kaufbeuren.de/Veranstaltung/cmx4ef2e31d21502.html>
Leiter: Elmar Dünßer

VHS Buchloe (22.05.2012)
<https://vhs-buchloe.de/Veranstaltung/cmx4ee1d58bacc6a.html>
Leiter: Elmar Dünßer

Plej granda kolekto da bildstrioj kaj humurbildoj en Esperanto

La retpaĝo bildejo.net por bildstrioj kaj humurbildoj en Esperanto celebris sian unuan datrevenon. Dum sia unua jaro bildejo.net senhalte kreskis, kaj nun enhavas pli ol 200 bildojn. Publikigante kvar pliajn bildojn en ĉiu semajno bildejo.net ne ĉesos kreski en 2012 kaj serĉas pliajn tradukistojn kaj kunlaborantojn. [Bildejo.net](http://bildejo.net) ankaŭ disponigas la regulan humurbildon de la germana artisto „mil“ por *Esperanto aktuell*. <http://bildejo.net/>

Pli videbla rolo por UEA en la terminologia mondo

Mélanie Maradan, komisiito por la rilatoj de UEA kun la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO) kaj kun Infoterm, povis raporti pri pluraj atingoj. En Majo UEA kaj Infoterm subskribis interkonsenton pri kunagado, laŭ kiu UEA kaj Infoterm interŝanĝos informojn kaj kunlaboros pri projektoj, renkontiĝoj kaj eldonaĵoj pri terminologio, leksikografio, lingvistiko, lingvolernado kaj administrado de informoj kaj strukturitaj enhavoj. Infoterm ankaŭ proponis al UEA traduki la dokumenton Gvidlinioj pri terminologiaj politikoj por apero en la retejo de Unesko. <http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=440#1>

Ĉu tro da lingvoj en EU?

La ekonomikaj sciencistoj Shlomo Weber (Southern Methodist University, Dallas) kaj Victor Ginsburgh (Bruselo) proponas al la EU-administrado rezigni pri 17 el 23 oficialaj lingvoj, ĉar sufiĉu la Angla, Franca, Germana, Itala, Hispana kaj Pola lingvoj. La lingva diverseco multekostas (pli ol 1 miliardon oni bezonas por tradukado) kaj malutilas al la ekonomio. Sed la ekonomikistoj ankaŭ diagnozas, ke du trionoj de la civitanaro estus malhelpataj per la

sola uzo de la Angla. Normoj, reguloj, diskutadoj restus nekompreneblaj. La gazeto Westdeutsche Allgemeine Zeitung opinias, ke la EU tre verŝajne ne supervivus la forigon de lingvoj kiel la Bulgara, Dana, ktp. La respekto je la individuaj naciaj kulturoj malpermesas reduktion de la lingva diverseco. www.derwesten.de, www.presseportal.de

Mortis Phil Bosmans

Phil Bosmans, iniciatinto de la „Movado sen nomo“, naskiĝis 1922 en Gruitrode, Limburgo, kaj estis belga katolika ordenano kaj aŭtoro de multaj edifaj verkoj. En 1941 li monaĥiĝis ĉe la monaĥoj Montfortanoj kaj en 1948 pastrigis. Ekde 1957 li tute sin dediĉis al la realigo de „Movado sen nomo“. Ĝis 1991 P. Bosmans estis la prezidanto kaj delegita administranto de „Movado sen Nomo“. Tiu organizo volas estigi solidarecon inter ĉiuj homoj, sendepende de riĉeco, raso, deveno aŭ religio. La baza ideo de Bosmans estis, ke en la moderna socio, oni havas tro multe da atento por strukturoj, por tekniko kaj teknologio kaj emas forgesi la simplajn homajn bezonojn. Tial li emfazis la Kulturon de la Koro. Bosmans simpatiis kun Esperanto kaj komprenis ke ĝi havas eblecojn por plivastigi la horizonton por la mesaĝoj pri la Kulturo de la Koro. <http://users.skynet.be/fa582651/msn/index.html>

Aprezo de honor-ofice laborantaj personoj

Ŝtatoj pli kaj pli ekkonas la gravan rolon de honor-ofice laborantaj homoj por la socio. Do la Landa Konsilisto Dietrich Kübler disdonis 56 distingajojn en Reichelsheim al diversaj personoj. En Brombachtal estas honoritaj reprezentantoj ekzemple de la libervola fajrobrigado kaj ankaŭ Andreas Emmerich pro lia agado por Esperanto.

www.echo-online.de/region/odenwaldkreis/reichelsheim

La projekto pri reta PIV ne haltis

Por ellabori retan version de Plena Ilustrita Vortaro estas kolektitaj monkontribuoj de 10.000 eŭroj. La teknika parto evoluis tute bone, la platformo estas jam kreita kaj baldaŭ devos esti finitaj laboroj pri la fina aspektigo de la retejo. Novembre aperis bezono haltigi ĉiujn laborojn, ĉar evidentiĝis ke ĉe la redaktantoj de la vortaro akumuliĝis multe da traktinda materialo, surbaze de kiu ili volis prilabori la enhavon de la vortaro. Ĉar ne indus ciferecigi la enhavon, kiu tre baldaŭ iĝos malĝisdata, estis decidite atendi pli freŝan version. Relative baldaŭ estos bezonataj volontuloj, kiuj pretus provlegi la ciferecigitan enhavon.

www.liberafolio.org/2012/la-projekto-pri-reta-piv-ne-haltis

IJK okazos 2012 en Vjetnamio kaj sekvajare en Israelo

Post la subita rezigno de Japana Esperanto-Junularo, la TEJO-estraro alprenis la decidon pri okazigo de la Internacia Junulara Kongreso (IJK) 2012 en Hanojo, Vjetnamio – samurbe kiel la Universala Kongreso. Decidita estas ankaŭ loko de TEJO-kongreso en 2013 – ĝi okazos en Israelo. La fonduso Partoprenu IJK-n denove povas helpi al membroj de TEJO. Per ĝi eblas peti monon por parte kovri vojaĝkostojn, loĝadon en provizitaj ĉambroj kaj programkotizon: <http://tejo.org/eo/p-ijk>

TEJO kaj Kontakto premias novajn membrojn

Ĉe la tt-ejo Iperity ekzistas TEJO kaj revuo *Kontakto* lanĉis abono- kaj membro-kampanjon, kiu disdonos premiojn por novaj membroj. Personoj, kiuj unuafoje aliĝos kiel individua membro de TEJO aŭ aparte abonos la revuon *Kontakto* komence de 2012, ricevos TEJO- aŭ *Kontakto*- T-ĉemizon. <http://www.tejo.org/eo/kampanjo-2012>

La filmo Universala Lingvo nun haveblas sur DVD

La nova dokument-filmo pri la historio de Esperanto farita de Usona Oskar-nomumita reĝisoro Sam Green estas disponebla sur DVD. La filmo, produktita kun financa subteno de Esperantic Studies Foundation, prezentas la tumultan historion kaj humanismajn idealojn malantaŭ Esperanto. Ĝi estas unu el la kronikoj de Green pri utopia pensado kaj praktikoj. La filmo estas aĉetebla per la interreto ĉe <http://esperantodocumentary.com/en/store>.

www.esperantic.org

Esperanto enkondukita en pliajn superajn lernejojn de Pollando

Esperanto estas enkondukita interalie en du pliajn superajn lernejojn de Pollando, nome en Biała Podlaska (en la centrorienta parto de la lando) kaj en Kraków.

(Maria Majerczak, <http://esperanto-reto.org/ilei/> -> Agado de polaj Esperanto-instruistoj -> Statistiko)

Jarĉefkunveno kaj nova estraro en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo

La nova estraro en Herzberg am Harz dum la venontaj tri jaroj estas la jena: Petro Zilvar (prezidanto) nun jam dum 35 jaroj, Harald Mantz (dua prezidanto), Zsófia Kóródy (viceprezidantino), Marika Frense (estraranino), Ursula Zilvar (kasistino), Mathias Reimann (estrarano) kaj Ewa Kukileka (novelektita estraranino). Kasrevizorino estas Helga Vogelsang. Anstataŭantoj estas d-ro Wilfried Hinrichs kaj Jürgen Tietz. Gabi Oturari estas la komisiitino por la nova Esperanto-projekto "Nacia Parko Harz". La plej granda defio en 2012 estos la organizado de la Internacia Fervojista Kongreso (19.05. - 25.05.2012) kune kun Germana Esperanta Fervojista Asocio.

Esperanto estas akceptita de fama Korea universitato Kyunghee

Unu el famaj koreaj universitatoj akceptis Esperanton oficiale kiel unu el klerigaj lerno-objektoj en la kuranta jaro. Nun en Koreio, kvar universitatoj (Korea Fremdlingva universitato, Dankook, Wonkwang kaj Kyunghee) malfermis Esperanto-lecionon por siaj studentoj.

LEE Jungkee

Filmo pri Tibor Sekelj

Ĉi-jare oni prifestas la 100-an datrevenon de Tibor Sekelj, kiu naskiĝis la 14-an de februaro 1912 kaj forpasis la 17-an de septembro 1988. Jam pasintjare UEA kontribuis al la informado pri Sekelj per ampleksa artikolo en la revuo *Esperanto* (junio 2011) kaj per prelego de Spomenka Štimec en la Malferma Tago de la Centra Oficejo la 26-an de novembro. La prelego estis filmata kaj ĝi estas nun spektebla en la Reta Kinejo de UEA.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, 443, 2012-02-09)

Libroproduktado en Esperantujo – jaro 2011

Dum 2011 en la libromarkato aperis 172 libroj en/pri Esperanto, kun entute 19.775 paĝoj, iom malpli ol averaĝe dum la lastaj dudek jaroj. La plej aktiva Esperanto-eldonejo denove estis Monda Asembleo Socia, prizorgata de Vilhelmo Lutermano. La superrigardo por 2011, publikigita en la februara kajero de La Ondo de Esperanto, aperis en la novaĵ-retejo La Balta Ondo.

<http://sezonoj.ru/2012/02/208knig/>.

Esperantista ministro en Slovenio

La iama esperantisto kaj ano de la Eŭropa Parlamento, Ljudmila Novak, estas la nova ministro pri "slovenoj eksterlande" en la freŝa registaro de

Slovenio. En sia posteno kiel eŭropa parlamentano ŝi antaŭ tri jaroj proponis enkondukon de Esperanto kiel komuna lingvo de Eŭropa Unio (EU). Novak en sia junaĝo studis Esperanton, kaj en 2007 partoprenis la kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio en Slovenio. Ŝi proponis, ke EU pristudu la eblecon kaj utilecon de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto.

Legeblas intervjuo en www.liberafolio.org.

Finiĝis la unua kursaro sur la Esperanto-Insulo en Hajnano

Februare finiĝis la kvarsemajna intensa kursaro sur la Esperanto-Insulo en Hajnano (Ĉinio). La aranĝon, kiu inkludis 200-horan intensan kurson por komencantoj, 144-horan pedagogian seminarion kaj du kursojn kadre de la Universitato de Esperanto. Partoprenis entute 130 personoj. Je la fino la partoprenantoj de la metodika kurso faris detalan analizon pri la kune pasigita monato. Fotojn kaj filmojn pri la kursaro kaj surinsula laboro oni povas trovi ĉe <http://www.ipernity.com/home/edukado.net> (<http://edukado.net/novajhjoj?id=215>)

Rezulto de la IKUE-balotoj 2011

Okazis baloto por la nova estraro de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). El la voĉdonrajtigita membraro voĉdonis 249 personoj (55%). Estas elektitaj por la kvar jaroj 2012-2015 la prezidanto Daminelli Giovanni, la estraranoj Sarandrea Carlo, Šváček Miloslav, Svaldi Pier Luigi, Belošević Marija, Lepping Stefan kaj la membroj de la Konsilio de la Kontorevizoroj: Cescotti Covelli Norma; Fossati Tiziana; Tomczak Krzysztof. (IKUE)

Kolektis kaj prilaboris
Uwe Stecher

Esperanto en libroj pri la regiono Harco

Antaŭ kelkaj monatoj aperis en la librovendejoj belega, granda libro pri Malsupra Saksio, „Eine Entdeckungsreise durch Niedersachsen“. En ĝi la aperis kontribuo de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy: dupaĝa artikolo kun titolo en Esperanto: „Koran bonvenon en Herzberg“. Ĝin ornamas multaj belaj fotoj el la Esperanto-vivo en la urbo.

Oni povas vidi grupon de ĝemelurbaj infanoj, dulingvajn ŝildojn, la monumentojn por Zamenhof kaj Gießner, la urbodomon, antaŭ kiu apud la germana majeste flirtas la Esperanto-flago. Mencio de Esperanto aperas ankaŭ en aliaj artikoloj pri la subdistrikto Osterode am Harz kaj pri la kastelo de la Velfoj en Herzberg.

Alia bildlibro kun la titolo „Gastlicher Harz“ (gastama Harco) aperis jam antaŭ kelkaj jaroj enhavante informriĉan ĉapitron pri Esperanto, la Esperanto-Centro kaj prezentadon pri Herzberg am Harz –la Esperanto-urbo. La tute nova bildlibro "Der Harz und sein Umland" (La montaro Harc kaj ĝia ĉirkaŭo) denove enhavas la artikolon, kiu popularigas Esperanton. Pro la fakto, ke la turismaj bildlibroj aperis en eldonkvanto de po 10.000 ekzempleroj, ni povas ĝoji pri vasta informado pri Esperanto. Ne nur libroj, ankaŭ aliaj eldonaĵoj transprenas informadon pri la lingvo kaj pri la Esperanto-urbo. En youtube oni trovas serion de filmetoj kun oftaj prezentoj de enurbaj Esperanto-objektoj, inter ili kompreneble pri la Zamenhof-monumento. Iu aldonis eĉ tekston en Esperanto pri la vivo de d-ro L.L. Zamenhof.

Dank' al la celkonscia agado de Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto-Centro kaj la plivastiĝanta intereso pri Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo pli kaj pli multaj ekstermovadaj varbiloj, broŝuroj, faldfolioj aperas menciante Esperanton kaj uzante la oficialan

kromnomon de la urbo. Bela lastatempa ekzemplo estas faldfolio eldonita en 10 000 ekzempleroj de la turisma asocio Tourist-Information e.V. Herzberg. Laŭ ties peto Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar de Interkultura Centro Herzberg verkis paĝon kun detala priskribo de Herzberg kiel Esperanto-urbo. Foto pri la Zamenhof-monumento bele ilustras la artikolon. En la oferto-listo 'Herzberg de A ĝis Z' aperas ankaŭ la Esperanto-Centro kiel vizitindaĵo.

Ni ĝojas, kaj fieras, ke la Esperanto-urbo fariĝis ĉiutaga realaĵo kaj konstanta, daŭripova varbloko por la internacia lingvo Esperanto.

Zsófia Kóródy

VDEL/AGEI: Einladung zur Mitgliederversammlung

Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer VDEL/AGEI: lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung im Rahmen des Gemeinsamen dänisch-deutsch-polnischen Esperanto-Kongresses (<https://is.esperanto.de/kek2012/>) in Berlin ein.

Diese findet am Samstag, den 26. Mai 2012, im Kongresshaus Orangerie, 10365 Berlin, Schulze-Boysen-Straße 38, statt. Beginn ist um 16:00 Uhr.

Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erhofft daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

Zsófia Kóródy,
AGEI-Vorsitzende / AGEI-prezidanto



Agnoskita popolaltlerneja Esperanto-kurso (VHS-Bildungsurlaub)

Jam la duan fojon Interkultura Centro Herzberg sukcese organizis klerigcelan feriosemajnon (Bildungsurlaub) kunlaborante kun la regiona popolaltlernejo en Osterode. La dua oficiala intensa kurso dum la unua semajno en marto 2012 allogis 10 partoprenantojn, venintajn el Nordrejn-Vestfalia, Heslando, Hamburgo kaj Malsupra Saksio.

La tutsemajna, kvinfoje-ok-hora intensa lernado estis ofertata al ĉiuj interesiĝantoj ĉu kun ĉu sen antaŭscio de Esperanto. Laŭ la lingva nivelo la kursanoj estis dividitaj en du grupojn: kvin personoj estis komencantoj, aliaj kvin bonaj lingvouzantoj. La ejoj de la Esperanto-Centro estis tre taŭga loko por la instruado: la biblioteko kaj la speciala pedagogia-metodika fak Kolektaĵo disponigis abundan materialon, multajn instruhelpilojn, ne nur por la antaŭtagmezaj lecionoj, sed ankaŭ por la posttagmeza kaj vespera ekzercadoj pri Esperanto-literaturo kaj -kulturo. Ĉiuj partoprenantoj ricevis multajn informojn, novaĵojn el la Esperantomovado kaj pri la uzeblo de Esperanto ĉu por personaj ĉu por fakaj celoj.

Zsófia Kóródy gvidis la konversacian, perfektigan kurson kaj zorgis pri la kapabloevoluiĝo en ĉiuj terenoj. Pliibonigo de gramatiko, riĉigo de vortprovizo, skriba kaj parola esprimkapabloj, diskutado, situaciaj ludoj, aŭskultaj taskoj apartenis al la ĉiutaga instruado kaj postulis de ĉiuj tre aktivan partoprenon.

Peter Zilvar okupiĝis pri la komencantoj kaj uzis la lernolibron de Stano Marček kiel bazan instrumaterialon. Pro la ripetitaj klarigoj kaj bona grupharmonio ĉiuj rapide kaj multe lernis.

Al la 40-hora lernado aldoniĝis aktiva lingvouzo ankaŭ dum la paŭzoj, komunaj tagmanĝoj, postlecionaj programoj, kiel

ekz. urborigardado, vizito al la kastelo, Esperanto-muzeo, kantado, rigardado de filmoj, prezentadmaterialoj. Ne mankis vesperaj programoj, inter kiuj elstaris la instruado de grekaj popoldancoj far unu el la kursanoj.

Speciala evento estis la renkontiĝo, babilado, kunlernado, ludado kun la Esperanto-klubanoj, kiuj ĉiumerkrede kunvenas en la Esperanto-Centro. La tre bonetosa babilado, tabloludado, traktado de interesaj temoj, bildprezentado kaj diskutado daŭris ĝis malfrua vespero. Verŝajne ankaŭ tio kontribuis al tio, ke preskaŭ ĉiuj kursanoj volas daŭrigi lernadon kaj planas reveni al sekva klerigsemajno kaj al aliaj renkontiĝoj aŭ kursoj de la Esperanto-Centro.

Eĉ la regionan gazetaron interesis tiu formo de lingvolernado. Ĵurnalistino

el Goslar vizitis la Esperanto-Centron, partoprenis kelkajn lecionojn kaj faris longan intervjuon kun Peter Zilvar kaj pluraj gastoj.

Evidente laŭ la katalogo de la kulturministerio en Hanovro Esperanto eĉ apartenas al la seriozaj studfakoj, do ne al la t.n. "hobifakoj". Pro tio la partoprenantoj ricevas oficialan VHS-atestilon, kiun la labordonantoj aldonas al la personaj aktoj de la dungitoj, kiuj povas ricevi pagatan klerigferiosemajnon. Laŭ la leĝo laborprenantoj havas la rajton je partopreno en oficialaj profesiaj klerigsemajnoj ĉiujare dum 5 labortagoj, plenumante 40 instruhorojn.

Kroma ĝojiga rezulto de tiu semajno estis, ke kelkaj kursanoj membriĝis ĉe Esperanto-kluboj kaj -asocioj, ekabonis Esperanto-gazetojn, kaj tri el inter la progresintoj, perfektigemuloj fariĝis membroj de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj.

La du unuaj sukcesaj klerigferiosemajnoj en 2011 kaj 2012 instigas nin je daŭrigo en marto 2013. Bonvenon!



Ne mankis eĉ dancado, dank' al Christian, unu el la kursanoj, kiu instruis grekajn popoldancojn

Irlando estas verda

**Estas finkompletigita la paĝaro de la kongreso, nome aldoniĝis prezoj de la hoteloj kaj nun eblas rete mendi kaj la hotelojn kaj la ekskursojn. Bonvolu viziti la riĉe informan paĝaron: <http://eeu-kongreso.webnode.com//>
Por finprizorgi la paĝaron kaj antaŭprepari la kongresajn kondiĉojn Maja Tiŝljär vizitis Galivon kaj kontrolis hotelojn, salonojn, diskutis kun la LKK-anoj. Jen ŝia raporteto.**

Dum monatoj mi nun okupiĝis pri Irlando: mi serĉis fotojn de la kongresa regiono, de la antaŭ- kaj postkongresaj celoj, tradukis tekstojn, kontrolis faktojn. Subite mi lernis amason da aferoj pri lando en kiu mi neniam estis. Kaj finfine novembre post centfoja rearanĝado de miaj planoj kaj taskoj aperis kelkaj liberaj tagoj por flugi al Irlando la unuan fojon en mia vivo kaj viziti Galivon. La bildoj en mia kapo jam estis sufiĉe klaraj post la preparado de informiloj kaj varbiloj kiam mi somere subite multe pli deziris flugi al Irlando ol al la kopenhaga UK, sed necesis ankoraŭ atendi.

Alveninte do nun al Dublino, elirinte el la flughavena konstruaĵo mi tuj ekflaris la maron. La insulo prezentigas per salo en la aero kaj kiel atendite griza ĉielo. La vojaĝo al Galivo estis kvazaŭ el iu imagbildo pri Irlando: du horoj de la oriento al la okcidento de la insulo tra verdaj paŝtejoj kun ŝafoj kaj bovinoj sub griza ĉielo. Sed malgraŭ la grizeco kaj eĉ sen iu ajn folio restanta sur la arboj, ĉiuj miaj antaŭjuĝoj ĝustis: Irlando estas verda lando! Nekredeble verda.

Alveninte al Galivo mi devis trapasi la urbocentron survoje al hotelo. La urbo ĉirkaŭ mi aspektis tre simile al mia imago de irlanda urbo: miksaĵo de ŝtonaj domoj kaj buntaj muroj, de trinkejoj kaj restoracioj, tre fabelecaj en frua vintra vespero. La unua tago komenciĝis sunplena por doni al mi imagon pri la somera kongreso. La tagoj postaj pluvaj kaj ventaj, maro griza kaj ŝtormema: la okcidenta marbordo de Irlando montris sian vintran vizaĝon dum mi marŝadis tra la urbo mezurante distancojn inter la hoteloj kaj la kongresejo, akompanata de ĉiam amikecaj irlandanoj el la LKK. Fakte mi tre ĝoje spertis la helpemon kaj simplecon de la irlandanoj, tute malformalaj kaj simpatiaj.



9-A KONGRESO DE EEU - 2012

**9-a Kongreso
de Eŭropa Esperanto-Unio**
(kunlabore kun Esperanto-Irlando)

16-a — 20-a de julio 2012

"Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli"


**Pli da informoj:
www.europo.eu**

**GALIVO / GAILLIMH / GALWAY
IRLANDO**

Finfine mi povas rekomendi Galivon proprasparte kaj inviti vin aliĝi al la kongreso ĉar Irlando fakte estas belega! Eĉ en pluvo kaj kun grizaj nuboj. Kaj en julio ni fakte havos la ŝancon vidi ĝin suna kaj eĉ pli verda kun la maro blua. Mi apenaŭ povas atendi mian sekvan vojaĝon printempe kaj mi esperas trovi kelkajn tagojn pli en mia kalendaro por vagadi iom tra la belega naturo de la regiono.

El: Eŭropa Bulteno Novembro 2011, No 110

Maja Tiŝljär



10

Logo
beibehalten

11

Anderes
Logo

So, Freunde der Sonne,

Trotz recht mäßiger Beteiligung an unserem Logowettbewerb haben wir ein paar Vorschläge für euch zusammenstellen können, und nun ist es an euch, über die Zukunft des DEJ-Logos zu entscheiden! Und denkt dran:

wer nicht mit abstimmt, kann sich anschließend auch nicht beschweren ;-)

Was es sonst noch Neues in diesem Frühling gibt und was in diesem Sommer noch kommt, das erfahrt ihr bei uns!

Caroline & Miriam

Sehr geehrte Mitglieder der Deutschen Esperanto-Jugend,

**Der große Tag ist endlich gekommen:
Möge die Abstimmung über das neue
Logo der DEJ beginnen!**

Die Abstimmung funktioniert folgendermaßen: ihr seht euch die Logovorschläge an, die in dieser Ausgabe abgedruckt wurden, und entscheidet euch für jenes Logo, welches ihr als das am besten passende zur künftigen Repräsentation der DEJ anseht, das also eurer Meinung nach am ehesten zum Charakter unseres Vereines passt und dabei noch gut aussieht. Das Logo wird auf der Internetseite, auf dem Briefkopf und auf Infomaterialien der DEJ zu sehen sein sowie eventuell Verwendung auf T-Shirts und ähnlichem Merchandise finden.

Die Nummer eures auserwählten Logos schickt ihr dann bitte mit eurem vollen Namen und Geburtsdatum (damit wir überprüfen können, ob ihr auch tatsächlich ein stimmberechtigtes Mitglied der DEJ seid) an kune@esperanto.de.

Ab dem 01. April kann auch auf unserer facebook-Seite abgestimmt werden. Wie genau, erfahrt ihr dort.

(Wir bitten euch, eure Stimme trotzdem nur einmal abzugeben. Wenn jemand mehrfach votiert, zählt die letzte Stimmabgabe.)

Was, ihr wollt gar kein neues Logo und habt das Gefühl, dass die Jahreshauptversammlung mit dieser Entscheidung nicht den Willen aller DEJ-Mitglieder repräsentiert hat? Dann wählt für Option 10, „Logo beibehalten“. Wenn es tatsächlich eine Mehrheit so sieht, bleibt alles beim Alten.

Oder habt ihr schon das Gefühl, dass die DEJ eigentlich ein neues Logo bräuchte, aber keiner der bisherigen Vorschläge gefällt euch? Dann wählt für Option 11, „Ein Anderes Logo“. Wenn diese Option eine Mehrheit bekommt, wird der Vorstand eine weitere Ausschreibung für ein professionelles Logo-Design bei www.designenlassen.de veranlassen.

Wie auch immer die Wahl ausfällt, am 30. April 2012, 24:00 Uhr wird die Abstimmung geschlossen, alle danach eingereichten Stimmen sind ungültig. Sieger ist derjenige

Vorschlag, der die meisten Stimmen auf sich vereinigen konnte. Im Falle eines Unentschieden entscheidet (hauptsächlich aus Zeitgründen) der Vorstand. Das Ergebnis wird in der nächsten -kune- bekannt gegeben.

Nachfragen? Hinweise? Kritik? Schreibt an: kune@esperanto.de

Word Race - iPhone App

**Tutnova estas la iPhone-aplikaĵo
"Word Race" de Chuck Smith.**

Tio estas ludo por grupoj ĝis 20 homoj pri klarigado de vortoj sen uzi similajn aŭ rilatajn vortojn. Do ekzemple, se la vorto estus "barbo", oni ne rajtus diri "haroj" aŭ "Zamenhof". La teamo, kiu plej rapide klarigas siajn vortojn, venkas! Ĝi ludeblas en la Germana, Angla kaaaaj... Esperanto! 42 vortojn vi povas provi senpage. Esploru ĝian mojosecon kaj amuziĝu kun viaj geamikoj - esperante! www.wordraceapp.com




La Somero en Esperantujo 2012

Was?	Das?	Wann?	Wo?
MELA (MEMzorga LAg-umado)	Chillen im Schlamm mit einem Musikfestival "Rock Otocec"	26.06. bis 03.07.	An einem Fluss in Slowenien
Roskilde Festivalo	im Zelt aushelfen und Musik genießen	30.06. bis 08.07.	Roskilde, Dänemark
KEF (Kultura Esperanto-Festivalo)	Esperanto-Kultur, also Musik, Filme und Spaß	10. bis 16.07.	Hillerød, Dänemark
SES (Somera Esperanto-Studado)	hochqualitative Esperantokurse, aber das Leben besteht ja nicht nur aus Lernen ;)	21. bis 29.07.	Nitra, Slowakei
UK (Universala Kongreso)	Vorträge, Diskutrunden und Kulturprogramm	28.07. bis 04.08.	Hanoi, Vietnam
IJK (Internacia Junulara Kongreso)	Vorträge, Workshops, Konzerte, ...	05. bis 11.08.	Hanoi, Vietnam
FESTO	Musik und französisches savoir-vivre	16. bis 23.08.	Metabief, Frankreich

Sollte euch das nicht ausreichen an Vielfalt, auf www.eventoj.hu/2012.htm gibt es viel, viel mehr ;)

Der Google Übersetzer übersetzt jetzt auch in Esperanto!

Für alle diejenigen, die es über Facebook noch nicht erfahren haben: Der Google-Übersetzer hat jetzt neben 63 anderen Sprachen auch Esperanto im Programm. Wollen wir ihn doch gleich einmal ausprobieren!



... Wie wir sehen, pfuscht der Google Übersetzer nicht nur bei unseren Hausaufgaben, sondern auch bei allen anderen Dinge, die wir übersetzt haben wollen. Als unser letztes Hilfsmittel kommt er da wohl nicht in Frage, da er sich noch viel unverständlicheres Zeug - als wir je könnten - ausdenkt. Ĉu tio rajto?



Gejunuloj dum Somera Esperanto-Studado 2011 en Nitra, Slovakio

Klasikaĵoj de Esperanto: „Karaj papo kaj mammo – la respondo“

Dira sano!

Ni ridis vian leteron el Berlino en GEJ-gazeto, en la marĉa numero, mi sinkas, kaj ni ĝojas vere maĉe ke vi filas fajne kaj ke vi ne gettis perdita en tiu granda cito. Ĉi-jare ni ventis al Anglio, Skotlando kaj Valizo. En Swanwich la britoj naŭ verkas bise por la fortia IJK. Ili selas butonojn kun la desegno de mejla ŝipo. Ni ankaŭ vantis luki al la palasto kie la kvino livas en Londono, bate estis granda trafikĝemo kun loto da karoj kaj kiam ni riĉis la palaston en la endo, ne estis alaŭdate eniri. Ili ne ŝovas la bildingon al turistoj.



Poste ni vilas goi al Liver-pulo kaj al Dub-lino.

Dira bojo! Kvankam vi hejtas ke mi rajtas tion: Ne nur pleju la tutan tagon ine kaj aŭte, duu ankaŭ iom da sporto samtime, tio estas bona por la maskloj en viaj armoj kaj legoj. Kiam vi estas hungaria, itu ion. Viaj Anto kaj Onklo viŝas ke vi komos homen sune.

Teku ĝin ize,
viaj lavantaj

Mamo kaj Papo.



Post du jaroj la anglalingvaj gepatroj de nia leterskribinta komencanto respondas. Tiu teksto estas skribita de Martin Weichert kaj unue aperis en la GEJ-gazeto 3/1984.

Unue ĝi estis publikigita en *GEJ-gazeto* (la antaŭa nomo de *kune*) 5/1982.

La aŭtoro estas Thomas Bormann, kiu kolektante falsajn amikojn el tekstoj de germanaj komencantoj havis la ideon por tiu teksto.

Se vi havas malfacilaĵojn kompreni, prononcu laŭte kaj pensu pri similsuna angla vorto.

Ĝuu tiun lastan parton de la serio!

(dankon al Andi Münchow kaj www.krokodilo.de/!)

Esperanto – edzperanto

estas konata proverbo en Esperantujo. Sed nun ĝi realiĝis en nova forumo. Ĉu vi estas inter 16 kaj 90 jarojn aĝa kaj serĉas vivkunul(in)on? Tiam provu trovi iun ĉe www.edzperanto.org. Speciala konsilo por virinoj: Estas jam 81 viraj kandidatoj kaj nur 13 virinaj!

‘kune’ estas la komuna membro-gazeto de la Germana kaj de la Aŭstria Esperanto-Junularo (GEJ kaj AEJ). Ekde 2011 ĝi aperas kiel interna revueto de *Esperanto aktuell*.

Korespond-adreso: Miriam Hufenbach, Carl-von-Ossietzky-Straße 55, 09126 Chemnitz, Germanio.

Retpoŝto: kune@esperanto.de

TTT: <http://www.esperanto.de/kune>

Estraro de GEJ:

Prezidanto: Julia Hell;

Vicprezidanto: Leo Sakaguchi; Pliaj estraranoj: Clemens Fries, Sophia Berlin, Helen Geyer kaj Liesa Alfier

Adreso de GEJ:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, Germanio.

Tel.: +49 30 42857899

Retpoŝto: dej@esperanto.de

TTT: <http://esperanto.de/dej>

Empfohlene Unterkünfte beim 89. Deutschen Esperanto-Kongress

Reservieren Sie selbst, aber benachrichtigen Sie das LKK (kek2012@esperanto.de). Geben Sie immer an, dass Sie zum Kongress gehören, evtl. Stichwort (s.u.).

Hotel-Pension Maxim

Alle Zimmer mit Bad, ohne Frühstück.

Doppelzimmer 46 EUR (pro Person 23 EUR), Dreibettzimmer 54 EUR (pro Person 17 EUR), Vierbettzimmer 64 EUR (pro Person 16 EUR)

Anmeldung: Tel.: +49(0)3085617480 info@pension-maximum.de Stichwort „Esperantokongress“

Lage: 10317 Berlin, Lückstr. 17, 10 min. Orangerie, 3 min. Max-Taut-Aula, 6 min. S-Bahnhof Nöldnerplatz

Grand City Hotel Globus

Standard-Einzelzimmer 50 EUR, Standard-Doppelzimmer 60 EUR, jeweils inkl. Frühstück

Möglichst umgehend reservieren, da sonst Zimmer zurückgegeben werden.

Anmeldung: Tel. +49 30 55507 0, Fax +49 30 97808 450

reservation.berlin@grandcityhotels.com

Stichwort „KEK 2012“

Lage: 10367 Berlin, Ruschestraße 45, 1500m Orangerie, 2600m Max-Taut-Aula).

Busfahrt zu beiden Kongressorten in 15 bzw. 17 Minuten

Hotel-Pension-Victoria

Zimmer „Economy“ (Dusche+ WC über Korridor erreichbar) pro Person ohne Frühstück 16 EUR

Zimmer „Komfort“ (Dusche+WC) pro Person ohne Frühstück 19 EUR

Frühstück (5 EUR) kann bei Anreise vereinbart werden.

Frühstück zu günstigen Preisen wird auch in benachbarten (Imbiss) Gaststätten angeboten.

Lage: 10317 Berlin, Kaskelstr. 50, 15 min. Orangerie, 5 min. Max-Taut-Aula, 3 min S-Bahnhof Nöldnerplatz

Hotel&Hostels HoLi Berlin

2- und 4-Bett-Zimmer, pro Person inkl. Frühstück 22 EUR

Lage: 10317 Berlin Wönnichstr. 69-71, 1200m Max-Taut-Aula, 2000m Orangerie, 1300 m S-Bahnhof Nöldnerplatz

Kalender spezieller Veranstaltungen im Jubiläumsjahr

(Näheres siehe auch *Esperanto aktuell* 2012/1, S. 12f)

2012-05-11 (fr), 15 Uhr Führung im Bundesarchiv Berlin, Lichterfelde, Finckensteinallee 63

<http://www.bundesarchiv.de/bundesarchiv/organisation/sapmo/index.html>

Eintritt frei, Anmeldung an Dr. Detlev Blanke
detlev@blanke-info.de

2012-06-15 (fr), 10 – 17 Uhr Symposium in der Bayerischen Staatsbibliothek München, Ludwigstr. 16 (Programm siehe umseitig) <http://www.bsb-muenchen.de/Einzeldarstellung.403+M562baccbf1d.0.html>

2012-06-29/30, fr ab 19 Uhr, sa 9 – 12 Uhr Kolloquium im Fritz-Hüser-Institut Dortmund, Grubenweg 5, <http://fhi.dortmund.de>
Teilnahme frei, Anmeldungen an Rudolf Fischer fischru@uni-muenster.de

OSIEK-konferenco junie en Ĉeĥujo

Internacia Esperanto-Konferenco

de Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK) okazos en Svitavy/Ĉeĥujo de la 14-a ĝis la 20-a de junio kun la temo "Sciencfikcio kaj robotoj". Enkadre de ĝi okazos ankaŭ "Seminario pri Esperanto-bibliotekoj kaj arĥivoj" gvidata de Detlev Blanke kaj paralele kun la prelegoj kurso por komencintoj kaj eternaj komencantoj per rekta metodo sub la gvido de Stano Marček. Ĉio-ĉi okazos en la Esperanto-muzeo en Svitavy.

Ĝis nun aliĝis 41 personoj el 13 landoj (CH, CZ, DE, ES, FR, GR, HU, NL, PL, RO, RU, SK, US). Tranokto en studenta hejmo (sufiĉe komforta, sed sen matenmanĝoj kaj mantukoj).

Pli da informoj vi trovos ĉe www.kava-pech.cz/ iek aŭ ne hezitu demandi min, se vi havas ajnajn demandojn. Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) de la 30a de septembro ĝis la 5a de oktobro 2012

Pied-iru en bela naturo kaj vizitu la vin-urbojn Kaub, Lorch, Assmannshausen kaj Rüdesheim, plie migru je la alia flanko de Rejno tra la Arbaro de Bingen kun vizito de burgo Rheinstein.

Fiksa tranoktejo en CVJM-gasthejmo Elsenburg en Kaub.

Transportoj per trajno, buso aŭ ŝipo. Nur 30 lokoj rezervitaj.

Detalajn informojn kaj aliĝilon vi trovas ĉe: www.esperanto.de/gea/ema2012.html

Skribu al: wolfgang.bohr@esperanto.de

Foto: Hedwig Fischer

Zwischen Utopie und Wirklichkeit: Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt

**Symposium am 15. Juni 2012. 10 bis 17
Uhr, in der Bayerischen Staatsbibliothek,
München, Ludwigstr. 16**

Aus dem Programm:

Ulrich Lins: Die ersten hundert Jahre des Esperanto

Gerhard F. Strasser: Konstruierte Sprachen im Wandel der Zeit: Von Hildegard von Bingens Entwurf einer religiösen Sprache zu Sudres ‚Langue musicale universelle‘

Heiner Eichner: Konstruierte Intersprachen: Herausforderung oder Chance für die Sprachwissenschaft?

Herbert Mayer: Die Sammlung Plansprachen der Österreichischen Nationalbibliothek: Geschichte und Gegenwart.

Die Teilnahme ist frei. Anmeldungen an *baes.sekretariat@bsb-muenchen.de*



© mil, <http://mycartoons.de/>

Tradukado de <http://bildetejo.net/>